

BOLETIM INFORMATIVO DA
ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
DE ESPERANTO

NIA BULTENO



INFORMA BULTENO DE
PORTUGALA ESPERANTO ASOCIO

Rua Dr. João Couto, 6 r/c. - A Tel: 74 13 59 LISBOA 4

1977

NOVEMBRO - DECEMBRO

Nº 17

AVIZO

"NIA BULTENO" informas ĉiujn samideanojn ke en la Ĝenerala Asembleo de nia Asocio, okazinta je la 22-a de lasta Oktobro, kaj en kiu partoprenis la tuta estraro de la Asocio kaj la direktoro de "REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO", ankaŭ asociano, estis decidite:

- a) interrompi la eldonadon de "NIA BULTENO";
- b) reestigi la gazeton "REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO" kiel oficiala organo de "Portugala Esperanto-Asocio";
- c) subteni la nunan direktoron de "REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO", kiu estos helpata de komisiono de tri asocianoj, kies prezidanto estos la prezidanto de nia Asocio.

"REVISTA PORTUGUESA DE ESPERANTO", kiel organo de "Portugala Esperanto-Asocio", estos sendata senpage al ĉiuj membroj de nia Asocio, sed ekde nun alvoko estas farata, por ke la antikvaj donacantoj al la du publikaĵoj, konsiderante la malfacilecon de la ekonomia situacio de nia Movado, daŭrigu ilian helpon samnivele aŭ, se estos eble, je plej alta grado.

(daŭrigo)

La generaligo de la aplikata meĥaniko, kiu motivas senlaborecon, malbonan distribuadon de la riĉaĵoj, konstantan plialtigon de la vivnivelo kaj, precipe, la intensigon de la patrolandaj kaj rasaj ŝovinismaj sentoj, estas serioza danĝero por la kompatinda homaro. Inter aliaj, la nomitaj kialoj alportas malutilon al la homa solidareco, al profitaj rilatoj inter popoloj kaj nacioj.

Sed, kio ajn okazos, neniam la ekonomikaj kaj kulturaj interŝanĝoj inter la nacioj ĉesos efektiviĝi. Tion postulas la reciproka komuneco de intereso, la konservado kaj supervivado de la tuta homa speco.

La aktuala ĉefa problemo estas manko de kompreno, de facila interkomunikado, de komuna idealo, de interfratiĝo, de tre pura amo.

Tiu manko de idealo kaj fido invadis niajn vicojn. Post la promesdona disvolviĝo de la propagando en la unuaj tempoj, dum dekoj da jaroj en Portugalio Esperanto estis konsiderata danĝera lingvo. La malpermeso kaj la persekutoj preskaŭ neniigis la movadon.

Finfine la permeso venis. Portugala Esperanto-Asocio denove kreiĝis. La espero ĝojigis la korojn de la fideluloj. Sed la kompetentaj kaj fervoraj batalantoj estas bedaŭrinde malmultaj. Surprizitaj pro la manko de intereso, pro la neatendita indiferenteco, ili ne kuraĝis ion fari, ne povis eviti la stagnon.

Post la revolucio de Aprilo 1974, kiel la fabela fenikso, la espero renaskiĝis. Sed la politika eŭforio, la troa partianeco, la disputoj, la trouzo de la libereco kaj la profesiaj postuloj gajnis la animon de la popolo kaj nuligis niajn klopodojn.

Malkonvinkitaj samideanoj seninteresiĝis aŭ

tute forgesis la movadon. Eĉ iamaj laboremaj⁹ pioniroj, kaj pro tio respondecaj, kuŝas hodiaŭ en senmoveco, en nenionfarado. La varbado de novaj adeptoj malfaciliĝas.

Jen malplezuriga sed evidenta kontrasto: en Portugalio, kies loĝantaro alproksimiĝas al 10 milionoj, la nacia organizo nombras centon da helpantaj membroj, la granda plimulto ne aktiva. Ĝi, pro nesufiĉaj monrimedoj, malfacile aperigas dumonatan bultenon tre modeste presitan.

La Bulgara Esperantista Asocio, ekzemple, registras la ekziston de pli ol 7 000 membroj. Publikaĵoj: Bulgara Esperantisto, Paco, Interligilo k.a., ĉiuj ili bonegaj laŭ la tipografia aspekto kaj la enhavo. Kaj Bulgario, kiel sciante, estas unu el la malgrandaj landoj de Eŭropo, kun 8 milionoj kaj 500 miloj da loĝantoj, rondcifere.

Triste mi asertas, ke Portugalio, priparolante pri eŭropaj kulturaj landoj, lokiĝas je la ariergardo de la marŝanta paciga armeo de la progresema Esperantio.

Ĉiuj ni devas honti, ĉar ĉiuj ni, escepte deko da aktivuloj, mergiĝis en kompletan inercion. Tial ke ni ne diligentas rompi la indiferentecon de la publiko, ĉiuj ni, mi ripetas, absolute kulpas.

Feliĉe, elstare figuras en la avangardo de nia nemilita taĉmento la nelacigebla, konstanta sekretariino. Ni devas al ŝi la varman elmontron de nia dankemo. Deĵoras egale en la unuaj postenoj de la gvardio la viglaj samideanoj, kiuj estras nian delegacion en Porto. Mi ne nomas ilin por ne vundeti ilian modestecon, sed mi petas aplaŭdon. Ke ni montru al la strebantino kaj al la aliaj avangardistoj nian aprobon per forta klakado de la manoj.

Denove mi faras demandon: ĉu la mondo suferas pro malplialtigo de sia intelekta nivelo? Tute ne! La ekspansio de la kulturo, supera, meza kaj unuagrada disvastiĝas hodiaŭ pli faci

4le ol neniam antaŭe. La lasta per la oficiala deviga instruado.

Multvariaj gazetoj, libroj, kinprezentadoj, radioelsendoj kaj la televido, alvenantaj eĉ al plej distaj, ignorataj pontoj disaj en la terglobo, akcelas ne nur la inteligentecon de la kulturitaj homoj, sed ankaŭ favoras la popularan kulturon, la homan scion.

La tekniko, la scienco, en la pratempo hermetikaj, privataj, propraĵo de korporacioj aŭ de ne multaj sciencistoj, kleruloj, etendiĝas en la nuno al la plej diversaj tavoloj de la socio. Sed la supera kulturo kaj la populara tre diferenciĝas. La unua apartenas al privilegiitaj elitoj aŭ al pli bone dotitaj homoj. Ĝi delonge ricevis kaj daŭre akiras grandegan impulson. La dua egale senĉese evoluas, sed tiel lantmove, malrapide, ke ĝi ŝajnas marŝi testudpaŝe aŭ stagni.

Kiel ajn estu, la konkeroj de la genio homa kaj la neceso de ĉiuspecaj interŝanĝoj akcelas la interfratiĝon kaj direktigas la mondon al celata vojo de plena internaciano.

La politiko de ekscesa patriotismo ne respondas al konstrua intergenta solidareco, al efektiva progreso, al vera civilizacio. Ĉar ĝi sin apogas sur la grupa egoismo kaj malamo, ĝi neas la puran humanismon.

Je la nomo de la superaj interesoj de falsa naciismo, la regantaj klasoj, la regnestroj alvokas la popolon al buĉado interfrata, al teruraj militoj.

Diris Zamenhof: "La nacionalismo de gentoj premataj estas multe pli pardoninda ol la nacionalismo de la gentoj premantaj". Sendube. Sed la ideoj kaj fortoj, atakaj aŭ defendaj, kiuj baziĝas sur la malamo ne povas esti eternaj. Ili estas fatale periigaj.

Certe ni, esperantistoj, komprenas, akceptas kaj kultivas la principon de la patrolando. Sed nia patriotismo estas pure scienca, paciga kaj supera. Ni nur subtenas kaj helpas la kon-

servadon de la naturaj, tradiciaj diferencoj⁵
de raso, moroj, spirito, lango kaj kulturo.

La koncepto de patrio, kiu pledas por la eternigo de refuteblaj interesoj kaj trudas la militon, kiu volas la ekspluatadon de la plimulto favore al senbremsa avideco de etaj homgrupoj, tiun malĝustan koncepton ni neas, alfrontas, forpelas kaj kombatas.

(daŭrigota)



ĈU POR NIAJ KLUBOJ?

Venontjare, precize dirite en 1978-12-10, la Universala Deklaracio De Homaj Rajtoj havos sian 30-an datrevenon.

Ĉu ne estos utile, ke Esperanto-kluboĵ aŭ la landaj asocioj jam nun mendu por siaj membroj grandan kvanton da ekzempleroj de la Esperanta traduko de la deklaro kaj bone pristudoŝ ĝin dum la jaro 1978? UN sciu, ke la Esperanto-merkato ne estas malgranda.

Ĝi estas mendebla ĉe: Ofidejo De Publika Informado, UN, UN Plaza, New York, N.Y. 10017, Usono.

(El "UN kaj NI" n-ro 7)

La Ĝenerala Asembleo de UN pasintjare proklamis la jaron 1979 "La internacia jaro de la infano" kaj asignis al la Por-infana Fondaĵo De UN (=UNICEF) rolon de la plenum-organo pri la Jaro (IJI). "Nia ambasadoro", s-ro R. Heri (Harry), antaŭvidas, ke tiu Fondaĵo eldonos Esperantan dokumenton pri IJI.

Ĉe UN en Novjorko okazis konferenco por ne-registaraj organizoj pri IJI, en 1977-06-27.

Universalan Esperanto-Asocion reprezentis s-ino Ĝuli (Julie) Tonkin.

(El "UN kaj NI" n-ro 7)

~~Sendo en mia adreso~~

Ni atentigas ĉiujn skribontojn al la Asocio, ke la adreso estas ŝanĝita jene:

Rua Dr. João Couto, 6, r/c-A

Lisboa-4

(Daŭrigo)

La japan-rusa milito estis vera katastrofo por Rusio. Pro la senutila suferado, la popolo aspiris al libereco, sed la cara polico rafinis sian kruelecon kaj persekutas la marksistajn proletojn kaj frakasas iliajn ribelojn, pli kaj pli oftajn en Polio.

Tien jam iris Leo Jogisches. Roza ŝanceliĝas inter la voko de Polaj kaj la retenoj de Germanaj k-doĵ.

Finfine ŝi aŭdis siajn amikojn en Berlino, kaj veturis pseŭdonime Varsovion, kie ŝi atingis la centron de la batalo.

Ribelo eksplodinta dum kristnasko kaj diversaj strikoj, kiuj nepre devis apogi ĝin, fiaskis pro malorganizado kaj nescio. En Moskvo kaj Peterburgo ankoraŭ formiĝas barikadoj, tamen oni sentis mankon de gvidado de la ĉefurbo.

Malgraŭ la malbonaj novaĵoj, ŝi rakontas: "ni daŭrigas la kontraŭleĝan laboron... ĉiutage homoj estas mortpafataj... kun revolvero en la mano, ni devigas burĝajn presejojn pretigi la kompostaĵojn."

Spite la kontraŭrevolucion minacon, ŝi kaj la aliaj k-doĵ verkis flugfoliojn, alparolis al la amasoj en tre sekretaj mitingoj.

La ribeloj lasis fundajn vundojn ĉie en la korpo de Rusio; senlaboreco disvastiĝas terure; heroecaj gestoj de solidareco ekaperis en multaj fabrikoj; oni donis unu, du tagsalajrojn semajne; oni reduktiĝis al 4 labortagoj, tial oni konstatis, ke la klaskonscio plialtiĝis.

Roza alfrontis ĉiujn danĝerojn kun brava kuraĝo. Ŝi konsciis, ke la revoluciaj travivaĵoj en Polio plifirmigis sian sperton por la estontaj luktoj.

Komence de la jaro ŝi iris al Berlino, kie baldaŭ ŝi estis arestata. Ŝi troviĝis inter 'politikaj' kaj 'ordinaraj' krimulinoj. La vivo tie estas neeltenebla. Dektriope la virinoj estis enŝlositaj en unupersona ĉelo. Sed, aldo

nas Roza, kompare kun antaŭe tio estas paradizo, tiam staris sesdek en tiu unupersona ĉelo. Oni ankoraŭ ne malkovris tiun, kiu ŝi estas. "La afero marŝas bone, malgraŭ premo kaj persekutado", diris Roza en siaj leteroj.

Ŝi estis transportata al la fifama citadelo de Varsovio, kiu estas la antaŭcambro de multnombraj revoluciuloj. Malgraŭ la tumultoj kaj kriegoj de ĉiuspecaj virinaĉoj, ŝi trovis la eblon vespere kaj nokte labori kelkajn horojn. Dume la danĝero pendis ĉiam super ŝia kapo: unufoje ŝi estis forkondukita kun tuko antaŭ la okuloj ien. "Kion vi sentis?", demandis poste siaj amikoj. "Mi hontis, ĉar mi sentis, ke mi paliĝis...".

En julio Roza estis liberigata; ŝi dankis sian liberigon al 'trafaj' argumentoj per kiuj la germana partiestraro prilaboris la aŭtoritatulojn.

Pasis monato antaŭ ol ŝi forlasis Varsovion. Intertempe ŝi sciis, ke Luiza Kautski malfeliĉe rompis sian kruron. Roza volis tuj flegi sian amikinson, sed premita de la eventoj, ŝi veturis alidirekten al Finnlando... Ŝi diris: "mi laciĝis kaj mia hararo griziĝis".

Kiam okazis la kongreso en Mannheim, ĝi trovis ŝin maldikiĝinta sur ŝia loko. La kongreso disrevigis ŝin. Ŝi sentis "la atmosferon de obtuza enuo". Roza pro la nervstreĉo nepre devas ripozi kaj ŝi serĉis la Sudon.

Kun L. Kautski ŝi iris al Garda-lako. Tie ĉi banita de la suno kaj ĉirkaŭita de lonceroj, cipresoj kaj laŭro, ŝi ripozis, sed ne tre longe. Baldaŭ ŝi adiaŭis sian amikinson. Dum la veturado trans Brenner norden ĝis la brumoj kaj ĉiuspecaj bataloj, ŝi revokas la krudajn disputojn, la seniluziaĵojn kaj la varman amikecon de multaj kunbatalantoj. Ĉio mikŝta kun iom da nostalgio de malproksimiĝanta juneco.



(daŭrigota)

ESPERANTO — MENSAGEM DE PAZ

(fino)

Esse coração, tão grande e generoso, não resistiu aos embates devastadores duma guerra que espantava o mundo, esse mundo que ele sonhara ver pacificado e unido como contributo da genial criação da sua língua auxiliar universal. A 14 de Abril de 1917, Luis Lázaro Zamenhof adormecia no sono do eterno descanso. Tinha apenas 58 anos. Todavia, se tivesse vivido mais 22 anos, teria assistido ao eclodir de uma nova guerra, maior e mais espantosamente destruidora que a anterior, teria sabido da prisão, pelos nazis, das suas três filhas e do seu encerramento num dos terríveis campos de concentração nazis, teria sido, ele próprio, preso, talvez. Três anos mais tarde saberia da segunda prisão das suas filhas e da morte da mais nova, Lídia, no campo de concentração de Treblinka. Lídia era, também, uma esperantista ferverosa, cheia de talento e generosidade que consagrara a sua vida ao ideal esperantista, dirigindo cursos de divulgação da língua em diversos países do mundo e traduzindo para o Esperanto obras importantes da literatura mundial e da literatura polaca, como "Quo Vadis?".

O Esperanto tem, igualmente, a sua literatura própria e original, que só os esperantistas podem ler, como tem a sua Imprensa, as suas obras científicas, os seus dicionários técnicos. Recebeu a aprovação da Unesco como criação de valor universal e com ela mantém contacto permanente. Depois desse reconhecimento por aquela entidade internacional para os assuntos de Educação e Cultura e da sua introdução nos programas oficiais de algumas escolas superiores e secundárias, esperavam os esperantistas que o Esperanto recebesse um vigoroso impulso de divulgação e aceitação a nível mundial e oficial. Porém, tal, não sucedeu, que

mais fácil é propagar-se uma marca de vinho ou de tabaco, que uma obra de incalculável valor para o progresso e enriquecimento cultural da humanidade. A escada ascensional do Progresso leva sempre longas décadas a subir. Há 90 anos, exactamente, que se completarão para o mês que vem, que o Esperanto está subindo essa escada, conduzido pela dedicação, pela compreensão e pela inteligência de homens de todas as nações e de todas as categorias sociais, paladinos e construtores do Futuro. E o Futuro, como as Civilizações, carece de muito esforço e de paciência sem limites para ser construído. Quanto maior for a sua projecção, mais demorará a sua erecção. Vai para dois mil anos que a Civilização Cristã, a autêntica, está a ser construída, e para a sua pretensa defesa se tem inventado guerras, tribunais e sistemas de toda a ordem, sarcasticamente.

O Esperanto é um elemento do Futuro, que os homens terão de compreender e aceitar um dia, como indispensável. Quando se abre ou se frequenta um curso de Esperanto está-se construindo o Futuro, por mais modesto que seja o seu fruto e o nosso contributo. O que importa é semear-se em todos os continentes a semente do Esperanto, que está germinando há 90 anos.

"Ni semas, kaj semas", declarou Zamenhof, num dos seus poemas, em nome de nós todos, esperantistas: "Nós semeamos e semeamos" - todo o tempo que for necessário, sem desânimo nem renúncia. De mão em mão, de estafeta em estafeta, o facho e testemunho do futuro e duma Civilização nova está sendo erguido e transportado.

Temos de criar uma humanidade nova, com uma nova mentalidade, novas aspirações e novas metas a atingir. Temos de ver os meninos que nos fi-tam e que tudo esperam de nós, temos de ouvir constantemente a vozinha cristalina que eu ouvi no Dia Mundial da Criança: "Nós não queremos a guerra. Queremos que toda a gente seja amiga".

70 Um dos pontos do programa esperantista é a introdução do Esperanto nas escolas, desde a primária. Para formar uma humanidade nova, temos de educar de uma maneira nova as novas gerações, temos de criar uma escola nova, que a velha não tem resposta para o apelo das crianças que nos dizem: "Nós não queremos a guerra!" Quando os meninos tiverem possibilidade de pensar na sua língua materna e em Esperanto, estarão pensando todos uns nos outros, reciprocamente, estará crescendo uma nova humanidade, a pensar num mundo novo, sem guerras nem campos de concentração, sem ódio, estará crescendo um Futuro de Paz e de Amor, "la Interna Ideo", ou Ideia Nuclear, central, do Esperanto, que Zamenhof nos legou com a Criação do seu Gênio pioneiro.

Alsácia Pontes Machado

VAGO DE ZAMENHOF

Ni avertas ĉiujn interesatajn personojn, ke la al Zamenhof honoriga vespermanĝo ne okazos en la dato menciita (15-a Decembro) sed ĝi estas efektivigota la 17-an Decembro, ĉar ĝi estos sabato, kaj tiamaniere multaj personoj povos aperi el malproksime.

Ĉiuj aliaj menciitaj kondiĉoj estas ankoraŭ validaj, kaj ne forgesu aliĝi al tiu honoriga festo, sendante vian nomon al PEA ĝis la 8-a de Decembro.

Krom la menciita honoriga vespermanĝo, PEA okazigos Esperantan Vesperon, la 18-an de Decembro, en Centro Social Sacor, Bairro Primavera, Bobadela.

Ĝi konsistos el prelego farota de S-ano Franco Simões kaj prezentado de loka grupo de gejunuloj, kiuj hore kantos esperantajn melodiojn.

La komenco de tiu Vespero estas markita por la 4-a horo posttagmeze de tiu dimanĉo.

Unesko kaj UEA subskribis kontrakton laŭ kiu, sub la nomo de Unesko, aperos broŝuro en Esperanto titolita "Rekomendo pri Edukado Cele al Internaciaj Kompreniĝo, Kunlaboro kaj Paco kaj Edukado Pri la Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj".

Estos eldonataj 15 000 ekzempleroj kies preskostoj estos kovritaj de Unesko kaj kies traduko kaj distribuo estos prizorgitaj de UEA.

Krome, ankaŭ la baza informilo pri Unesko estos eldonita en Esperanto kaj jam ekzistas interkonsento inter tiuj du organizaĵoj pri ĉiuj aspektoj de tia projekto.

Aliflanke, UEA pretigas tri jenajn dokumentojn:

baza dokumento pri Esperanto kaj UEA, raporto pri la 62-a UK kaj dokumento pri la kongresa temo "La Rajto je Komunikado". Ĉi tiuj dokumentoj servos kiel materialo por informkampanjo direktita al ĉiuj naciaj reprezentantoj ĉe Unesko, landaj Unesko-komisionoj, neregistritaj organizaĵoj, ktp.

* * * * *

En Britio fondiĝis sindikata kaj koopera Esperanto-grupo kies honora prezidanto estas s-ro Jack Jones, ĉefsekretario de la plej granda brita sindikata organizaĵo. Apogas la grupon 12 gravaj sindikataj funkciuloj kaj 23 parlamentanoj. Eldono de 100 000 ekzempleroj de faldfolio en angla lingvo pri Esperanto estis vaste distribuata inter la sindikatanon, fare de la grupo.

- - - - -

En Suda Koreo du universitatoj okazigas Esperanto-kursojn en feriaj periodoj. La Universitato Gugĝe jam okazigis sian 10-an kurson kaj la Universitato Mjongĝe sian 15-an.

+ + + + +

12 Por diplomiĝi en la Konstrua Teknikumo en Bjalistoko, Zbigniew Cierebiej plenumis ekzamenon pri la temo "Esperanto Kiel Propagandilo de la Pola Literaturo en la Mondo". Al lia ekzameno estis donata la noto 'tre bona'.

* * * * *

Al la 25-a Kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, kiu okazis en la Universitato de Georgetown (Vaŝingtono) la pasintan Julion, la usona prezidanto Jimmy Carter sendis la jenan mesaĝon:

"Mi sendas plej varmajn salutojn al la delegitoj en ĉi tiu 25-a Jara Konferenco de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.

Plibonigita komunikado inter individuoj kaj nacioj estas unu el la ĉefaj metodoj por konstrui pli grandan internacian interkomprenon kaj bonvolon.

Mi laŭdas viajn klopodojn kontribui al tiu celo kaj deziras al vi tre fruktodonan kaj sukcesplenan kunvenon."

* * * * *

La 37-an Kongreson de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista partoprenis 707 personoj el 23 landoj. Ĝi okazis en Pollando, pasintan Aŭguston, sub la protektado de la karkova Kardinalo Wojtyła.

La Papo mem sendis salutan telegramon al la Kongreso kies inaŭgura meso estis celebrata de sep episkopoj kaj 50 sacerdotoj el diversaj landoj.

* * * * *

Ekde la komenco de estanta jaro la Vatikana Radio elsendas ĉiudimance dum dek minutoj programon en Esperanto. La frekvencoj estas: mezlonga ondo (ĉiudirekten): 1529 kHz; kurtlongaj ondoj (en direkto de Eŭropo) 6190, 7250 kaj 9645 kHz.

La elsendoj okazas je 21.05 ĝis 21.15 laŭ mez-eŭropa horo.

* * * * *

En Luksemburgo, pasintan Julion, okazis la¹³
11-a Internacia Konferenco de Internacia Ligo
de Esperantistaj Instruistoj. La konferencejon
oni starigis en moderna hotelo "Holiday Inn",
kiu faras siajn reklamojn ankaŭ en Esperanto.

* * * * *

En la Urba Publika Biblioteko en la urbo
Kortrijk (Belgio) ekzistas, starigita en 1971,
"Esperanta Fondaĵo C. Vanbiervliet" kiu jam
enhavas pli ol 5500 esperantaĵojn (librojn,
jarkolektojn de revuoj kaj gazetoj, ktp).

* * * * *

La venontan jaron kun partopreno de italaj
kaj hungaraj sciencistoj la universitatoj de
Venecio kaj Budapeŝto okazigos simpozion pri
interlingvistiko kaj Esperanto.

* * * * *

Grupo de esperantistoj en Rimini (Italio)
starigis esperantan radio-stacion kun la nomo
"Esperanto-Radio 44-a Paralelo". Ĝi staras en
franciskana monaĥejo, ĝi estas sufiĉe bone eki
pita kaj la elsendoj atingas la distancon de
30 km, tamen oni intencas plipotenci ĝin
(100 km).

ESPERANTO-DOMO

Nova "Esperanto-domo" estos konstruita en
Tokio de Japania Esperanto-Instituto kun celo
plifortigi la Esperanto-Movadon en tuta Azio.

Oni esperas inaŭguri ĝin en mezo de venonta
jaro kaj ĝi konsistos el kvaretaĝa konstruaĵo
inter kies ĉambroj oni trovos bibliotekon, kun
venejon, lernoĉambron, vendejon, oficejon, ktp.

DONACOJ POR "NIA BULTENO"

S-ano Augusto Pereira Júnior	60\$00
S-ano Francisco Pires	80\$00
S-ano Eduardo Padrão	100\$00
S-ano D-ro Pedro Cunha Serra	60\$00

"En la nomo de Portugala Esperanto-Asocio kaj en mia propra mi prezentas la plej respektajn salutojn al altestara Ŝtatisto kaj eminenta samideano al kiu la Paco kaj la esperantista Movado tiom ŝuldas."

Ĉi mesaĝo, subskribita de D-ro Albertino dos Santos Matias, prezidanto de PEA estis sendata la 17-an Oktobro al Prezidanto de Jugoslavio, Tito Broz, okaze de lia oficiala vizito al Portugalio.

ESPERENTO LANĈITA EN LA KOSMON

En 1977-08-20 la usona kosmoaviada instanco NASA lanĉis raketon "Vojaĝanto 2", pri kio la amaskomunikiloj tra la mondo raportis. La "Vojaĝanto 2" survojas al Jupitero, kiun ĝi ĉirkaŭos en 1979. Poste ĝi vojaĝados al Saturno (kiun ĝi atingos en 1981), al Urano (1986), al Neptuno (1989) kaj fine eliros el nia sunsistemo.

La "Vojaĝanto 2" portas sondiskon kun diversaj teraj sonoj, i.a. voĉoj de la ĝenerala sekretario de UN kaj de s-ro Ralf Heri. Al demando de kolegoj, ĉu kosmuloj Esperanton komprenos, Heri respondis, ke aliastranoj deĉifros ĝin almenaŭ 4-oble pli rapide, ol svedan poemon.

(El "UN kaj NI" n-ro 7)

GAZETABONOJ

Ekde la 1-a de Marto 1978, la abonprezoj de la revuo "EL POPOLA ĈINIO" estas jenaj:

1 jaro	80\$00
2 jaroj	120\$00
3 jaroj	160\$00.

La abonprezo de "HOMO KAJ KOSMO" estas por 1 jaro 100\$00.

Jen artikoleto en kiu mankas la vortfinaĵoj.
Kompletigu kaj ensendu ĝin al la redakcio.

Inter tiuj konkursantoj, kiuj ne faris eĉ 1
eraron, ni dislotos unu premion.

I franc gazet publikig interes artikol,
en ki pariz kuracist varm rekomend , ke
post la manĝ oni kant . Laŭ la klarig de la
kuracist ĉi hom , sed precip la stomak-mal-
sanul kaj ti person , kies digestad ne est
en ord , spert ver ben , se ili post la tag-
manĝ dum dek minut kun plen fort kant , ĉar
la kantad boneg influ la funkciad de la di-
gest organ .

SOLVO DE PASINTA NUMERO 16

Kiam kato jam formanĝis, forpelado ne valoras.

* * * *

Iam demandis paciento al kuracisto:

-Ĉu vi opinias, ke ankaŭ mi vivos cent jar-
ojn, kiel mia patro?

-Kiom da jaroj vi havas? -demandis la ku-
racisto.

-56.

-Ĉu vi trinkas vinon?

-Ne.

-Ĉu vi fumas?

-Neniam.

-Ĉu vi kartludas?

-Tute ne.

-Ĉu vi manĝas multan viandon?

-Mi estas vegetarano.

-Ĉu vi ŝatas virinojn?

-Ne tre multe.

-Nu, kial vi volas vivi 100 jarojn?



1979: INFANA JARO

En la disvolviĝantaj landoj mankas aŭ ne sufiĉas "bazaj servoj", necesaj en la vivado, kiaj estas sanzorgado, edukado kaj nutrado.

Tiajn bazajn servojn ne ĝuas aŭ ne sufiĉe ĝuas - en la tuta mondo - 900 milionoj da homoj (proksimume kvarono de la tuta homaro). El ili 350 milionoj estas infanoj. Duono de tiuj infanoj, antaŭ ol ili atingas la aĝon de 5 jaroj, mortas pro ĥolero aŭ disenterio, kiun peras akvaĉo kaj kiun oni povus eviti per instalado de simplaj pumpiloj.

PARTOPRENO EN JUBILEO

Lastatempe Unesko eldonis broŝuron "Unesko: 1946/1976; Trideka datreveno de la organizo".

Ĝi entenas 5 paroladojn kaj 64 mesaĝojn de monde gravaj personoj kaj organizoj. En ĝia 78-a paĝo troviĝas ankaŭ la mesaĝo de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Ateno pasintjare.

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro Juris Cibulis
Tilza
Valvu raj
Latovia (USRR) 228772

S-ro Tomasz Chmielik
Nadiesnictwo-Swidnik
PL-21-040 Swidnik
POLLANDO

S-ro Ladislav Kralovec
Postovni priharadka 17
317 62 PLZEN 12
CEHOSLOVAKIO

Dott. Pietro Micanti
20010 Bareggio (MI)
Via Lupi di Toscana 8
ITALIO

Director:

D. Olga Serra Marques de Almeida

Propriedade de:

Associação Portuguesa de Esperanto

Redacção e Administração:

Rua Dr. João Couto, 6 r/c -A - Lisboa 4

Composto e impresso:

Furtado & Saldanha, Lda

Rua Capitão - Mor Pedro

Taveira, 5 - A

BIMENSAL